FN PER ANC 47

# Normanda Esperanto-Bulteno

BULLETIN TRIMESTRIEL. TRIMONATA BULTENO. N° 7

--- MARTO 1969 ---

Redaktas: S-ino J. VINCENT. Rue des Oiseaux -27- LES ANDELYS

Sendu la manuskriptojn antaŭ la 10-a de februaro, 10-a de majo, 10-a de aŭgusto kaj 10-a de novembro.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

ENHAVO:

Paĝoj: 1 & 2: Bonuloj...kaj malbonuloj
2: Nacia konkurso
3: Vivo de la grupoj
Kial vi lernis Esperanton?
4: Vortoj de la kasisto
Por la infanoj
Kotiztabelo
5: Ĝenerala kunveno de la U.F.E.membroj

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

## BONULOJ...KAJ MALBONULOJ

Doktoro Zamenhof, kreinte la Internacian Lingvon Esperanto, ĝin donacis al la tuta homaro, dirante, ke lia kreaĵo estas ĈIES propraĵo. En famkonata prelego, en Bulonjo ĉe Maro, dum la unua Universala Kongreso de Esperanto, li diris, ke, en la salonego, ne estas diversnaciuloj, sed HOMOJ, kunigitaj per la sama idealo.

Do, la iniciatinto de Esperanto volis, ke, PER Esperanto, la homoj povu interkompreniĝi kaj, sekve, ami unuj la aliajn. Kompreneble, li ne opiniis, ke estas unuflanke la "bonuloj", aliflanke la "malbonuloj", aŭ la "puruloj" kaj la "malpuruloj", cetere, eĉ se ili estas neesperantisto

Tamen, kelkaj esperantistoj mem ŝajnas havi tiun malĝustan vidpunkton; kaj oni ja scias, laŭ historiaj ekzemploj, ke, per tiu unuagrada reago, oni, tre ofte, alvenis al maljusteco!

Kial la suprediritaj esperantistoj tiel opinias? Ĝenerale, ili diras, ke ili klopodas POR Esperanto kaj la aliaj (la malbonuloj) laboras por tia aŭ tia idealo PER Esperanto! Kaj la milito inter du "simplaj vortoj" tiel eksplodas!

Certe, estas ja devo por ĉiu esperantisto disvastigi nian lingvon, sed kial? Ne por laŭdi la Majstron (kiu malŝatis tiun vorton), sed por

alveni, paŝon post paŝo, al la"bela sonĝo de l' homaro". Nu, se tiuj, kiuj uzas Esperanton, celas al tiu fino, militante PER Esperanto, ankaŭ ili plenumas sian esperantistan devon.

Tial, volante kunigi ĉiujn normandajn esperantistojn, kelkaj agemaj pioniroj fondis l' Unuiĝon de la Normandaj Esperantistoj, malfermitan al ĉiuj.

Eble, oni povas riproĉi- kaj, efektive, oni riproĉas- al U.N.E fari ne multe da laboro; verdire, l' Unuiĝo ...estas ni, kaj ĝia laboro estas ĉies laboro. Sed libere konsentita unuiĝo estas jam valora fakt

Ĉiu daŭre faru sian laboron, grandan aŭ malgrandan, laŭ ebleco, kelkafoje eraran, sed ĉiam sinceran.

NI RESTU UNUIĜINTAJ!

Marcel BOSC, Honorprezidanto — Maurice HUET, Prezidanto
de l' Unuiĝo de la Normandaj Esperantistoj.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

NACIA KONKURSO.

La Zamenhofa Kulturcentro por Internacia Amikiĝo en Les Andelys aranĝas ĉijare grandan nacian konkurson, kun 800 F da premioj.

1-a premio: 500 F vojaĝstipendio por veturi al Helsinki
2-a premio: 200 F vojaĝstipendio por veturi al Helsinki
3-a premio: albumo Thiaude kun 375 francaj poŝtmarkoj neuzitaj ( valoro 60 F)
4-a ĝis 7-a premioj: libroj en valoro de 10 F, mendeblaj ĉe UFE.

Regularo de la konkurso havebla kontraŭ afrankita koverto al

Centre Culturel et d' Amitié Internationale Zamenhof
8, Boulevard Néhou
27-LES ANDELYS

antaŭ la 1-a de aprilo 1969.

Partoprenu multnombre kaj la plej bona gajnu!

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

NEKROLOGO.- La 28-an de novembro 1968 forpasis en sia 66-a vivojaro

Sinjorino DESPERROIS Renée

ekslernejestrino en Evreux. Ŝi estis fidela membro de nia asocio, partoprenis multajn normandajn, naciajn kaj universalajn kongresojn.

Ni sincere kondolencas al ŝia familio.

## VIVO DE LA GRUPOJ.

**LE HAVRE.** La ĝenerala kunveno okazis la 25-an de januaro.

**LES ANDELYS.** La 7-an de februaro okazis la ĝenerala kunveno sub prezido de S-ino Graffin. Post unuanima aprobo de la morala kaj financa raportoj, oni resumis la aktivaĵojn de 1968 kaj prezentis la projektojn por 1969:
16/22-an de februaro: semajno de internacia amikeco;
Paskaj ferioj: partopreno en la franca-germana kongreso en Strasbourg kaj en la brita en Dublin;
24-an de aprilo/8-an de majo: nacia konkurso kun 800 F da premioj ( vidu p. 2);
29-an de majo kaj 1-an de junio: ekzamenoj;
14-an de junio: disdono de la premioj kun Sicilia vespero;
someraj ferioj: partopreno en la Grésillon-aj staĝoj kaj en la U.K en Helsinki.
La konsilantaro konsistas el: S-ino Vincent, prezidantino; S-inoj Blanchard kaj Bonnet, vicprezidantinoj; F-ino Bonnet kaj J. Rouen, sekretarioj; A. Graffin kaj R. Monnier, kasistoj; F-inoj Graffin kaj Robin, membroj.

**LISIEUX.** La Lekzovia Esperanto Grupo kviete travivadas: krom la ĉiulunda kurso en la Domo de Junularo kaj Kulturo, ĝi estigis ĉiumonatan renkontiĝon, kiu kontentige prosperas, kunigante Caen-ajn kaj Lekzoviajn gesamideanojn. La lasta rendevuo okazis la 17-an de januaro kaj S-ro Rault atentigis nin pri tio, ke ni festas iele jubileon: efektive, la prasignoj de esperantista agado en Lisieux datumas de 1909, laŭ la lokaj arĥivoj.

**ROUEN.** La lasta kunveno de la grupo okazis la 11-an de februaro kun elmontrado de diapozitivoj pri la akcepto de Klement Krebs, lastjare.

==========================================================

## KIAL VI LERNIS ESPERANTON?

De mia infanaĝo mi aŭdis pri Esperanto kaj konis la noblan idealon, kiun kaŝas tiu simpla vorto. Mi trovis la ideon genia kaj tre deziris lerni tiun Internacian Lingvon. Jen kial mi ĝin lernis tuj kiam prezentiĝis oportuna okazo. Mi nepre deziris havi kontaktojn kun alilandanoj, scii, kion ili pensas, koni iliajn morojn, kutimojn, vivmanieron, historion, unuvorte, ĉion, kiu rilatas al la HOMO, de kiu ajn lando LI estu.

Doktoro Zamenhof ja iniciatis Esperanton unue por ebligi al la diverslandaj homoj kompreni unu la alian kaj larĝe malfermi sian spiriton al la cetera mondo. Estas senutile lerni Esperanton por babili en vespera kunveno kun la samurbanoj se oni poste neniam havos kontaktojn kun alilandanoj. Pro tio, ŝajnas al mi absolute necese aliĝi al internacia Esperanto-organizo, prefere neŭtrala, kiu informas siajn anojn pri ĈIUJ flankoj de la Esperanto vivo en la mondo. Tio estas komprenebla opinio mia kaj mi tre ĝojus legi alies vidpunktojn en la venontaj numeroj de nia bulteno.

S-ino Vincent.

VORTOJ DE LA KASISTO.

S-ro E. Jouis, 621, rue Georges Mugnier 76-Boisguillaume, kasisto de la Unuiĝo de la Normandaj Esperantistoj(U.N.E) alvokas al la samideanoj, kiuj ankoraŭ ne pagis sian kotizon (2 F) por 1968 kaj 1969. Ili tion faru kiel eble plej rapide.

Nia asocio estas malfermita al ĉiuj normandaj esperantistoj sendepende de siaj apartenoj (U.F.E, S.A.T ...) La bulteno ankaŭ servas al ĉiuj kaj estas nun la sola ligilo inter la normandoj. Ĝi vivas per viaj kotizoj, kaj ankaŭ per la sinofero de la redaktorino, S-ino Vincent.

Do, tiuj, kiuj ankoraŭ ne tion faris, tuj sendu la 2 F (aŭ pli) al:

Union Espérantiste de Normandie c.c.p. Rouen 283-40 E

Oni ankaŭ povas pagi per alia rimedo aŭ al la kasisto de sia loka grupo. Antaŭdankon!

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

POR LA INFANOJ ( daŭrigo)

SUR LA KAMPOJ.

Nun, Francisko pasigas ĉiujn siajn tagojn sur la kampoj. Por li ne plu estas ĵaŭdoj, nek dimanĉoj, nek festotagoj. Ĉiuj tagoj estas similaj. Li foriras en la mateno, kiam la suno frontas super L' Argentière, kaj kiam la vilaĝo vekiĝas, bruplena. Li malfermas la pordon de la ŝafejo kaj eliriga la bestojn kriante:

- Truste!..Truste!..Mani!..Mani!..

- Kun la dusako sur la dorso, la bastono aŭ la vipo en la mano, li puŝas siajn bestojn sur la strateton. La homoj, kiuj lin vidas iri malantaŭ sia ŝafaro, diras:

- Jen Francisko, kiu iras paŝti!.. Li ne estas okjara, kaj li jam ŝparigas ŝafiston al sia patro!..

Mario atingas lin sur la vojeto. Kelkfoje ili iras al Côte-Belle, aŭ al La Combe, aŭ al Chalou. Ili estas kontentaj.

( daŭrigota)

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

KOTIZTABELO.

Union des Espérantistes de Normandie. . . . . . . . . . . . . . 2 F
p.ĉ.k. Rouen 283-40 E

U.F.E.( kun "Revue Française"). . . . . . . . . . . . . . . . . .30 F
U.E.A.( kun "Esperanto" kaj Jarlibro) . . . . . . . . . . . . . 35 F
Fédération Normande des Centres Culturels Esperanto p.ĉ.k.Rouen 2348-06Z

==========================================================================

Dépôt légal: 2ème trimestre 1969. La gérante: Mme J. Vincent.
Polycopié par le Centre Culturel et
d' Amitié Internationale Zamenhof 27-Les Andelys.

## ĜENERALA KUNVENO DE LA U.F.E-MEMBROJ ( FEDERACIO )

Por prepari la nacian kongreson, kiu okazos en Strasbourg je Pasko, U.F.E. invitas ĉiujn siajn normandajn membrojn kunveni en

EVREUX, la 23-an de marto 1969, en "Hôtel de l' Ouest",

vidalvide al la stacidomo. Ili bonvolu plenigi kaj resendi la ĉisuban demandaron antaŭ la 20-a de marto al: S-ino N. Bellettre 20, rue d'Hardencourt 27-Evreux.

Komuna tagmanĝo okazos en la kunvenejo mem. Prezo: 20 F.

------------

Tagordo de la ĝenerala kunveno:

Ekde la 14-a:

I Raportoj: - de la sekretario
- de la kasisto
- debatoj pri tiuj raportoj

II Renovigo de triono de la konsilantaro:

La mandatoj de la 2 jenaj komitatanoj nun finiĝas: F-ino Beaudouin (Lisieux), S-ro Jouis (Rouen). Ili bonvolu informi nin ĉu ili rekandidatiĝos. Novaj kandidatoj bonvolu anonci sin antaŭ la 20-a de marto (ĉisupra adreso).

III Preparo de la franca-germana kongreso en Strasbourg:
- studado de la jarraportoj de U.F.E.
- elekto de nia delegito

IV Junularaj problemoj:
- raportoj pri la jara agado en Francujo
- kalendaro de la someraj renkontiĝoj

Eventuale povus okazi ekzameno por la unuagrada diplomo. La interesuloj skribu tuj al S-ino Bellettre, kiu decidos pri la loko kaj horo.

---

Normanda Esperanto Bulteno